

Lingvistikaj Konceptoj de Zamenhof¹

Liu Haitao

La plej bazaj principoj, sur kiuj Zamenhof konstruis sian lingvon, troviĝas en la antaŭparolo de la unua libro de Esperanto. Tie, Zamenhof starigis la problemojn, kiuj necese estu solvitaj dum oni konstruas internacian lingvon kiel Esperanto:

- (1) La lingvo estu eksterordinare facila...
- (2) Ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la kompreniĝado kun homoj de diversaj nacioj...

Per tiuj taskoj, Zamenhof diris al ni, ke oni devas taksi la lingvan kompleksecon el tri flankoj: akiri, rekoni kaj produkti. En lia tempo la ideo sendube estas kreiva, ĉar multaj samtempaj aŭtoroj de planlingvaj projektoj nur penis doni al siaj projektoj la trajton de tiel nomata 'tuja komprenebleco'.

Zamenhof donis al ni la plenan gramatikon kun nur 16 reguloj en la unua lernolibro de internacia lingvo. Malgrandaj gramatikoj ne nur faciligas la akiradon de lingvo, ĝi ankaŭ grande liberigas la uzon de la lingvo. Zamenhof ankaŭ al ni liveris vortaron kun ĉirkaŭ nur 900 vortoj. Por esprimi pli multajn nociojn per tiuj limigitaj vortoj, Zamenhof refoje turnis sin al la reguloj, laŭ kiuj oni lerte povas kombini jam havatajn vortojn por esprimi novaĵojn. Nu, la reguleco, precipe, la senescepteco de la regulo, rajte estas konsiderata kiel la plej kerna kaj esenca elemento de Esperanto.

Estas reguleco, kiu lin helpis meti ĉiujn necesaĵojn por lingvo en 16 regulojn kaj 900 vortojn. Laŭ Zamenhof, en lia lingvo

1. ĉiu elemento egalas al vorto,
2. ĉiu elemento estas vorto sensanĝa kaj memstara en la teksto,
3. ĉiu elemento havas sencon kaj formon, kiuj malsamas disde aliaj,
4. ĉiu elemento povas libere kuniĝi kun ĉiu alia laŭ sintaksa kaj semantika bezonoj.

Per tiuj ĉi principoj Zamenhof kreis lingvon, kiu esence malsimilas Eŭropajn lingvojn, kiujn li scipovis.

La lingvo unuavice estas ilo por komunikiĝo. Tion Zamenhof bone komprenis. Do, la lingvo ne nur devas esti facile lernata, sed ankaŭ tuje rekonebla kaj komforte produkta. Por konstrui tiaĵon, li ne nur eltiris el etnaj lingvoj la ĉefajn radikojn, li ankaŭ faris regulojn por laŭbezone kombini tiujn radikojn, kreive enkondukis plenfunkciajn afiksojn, kiuj povas multe produkti novajn vortojn surbaze de malgranda vortaro. Por ligi tiujn ĉi radikojn en integraĵo, li kreis klaran kaj travideblan finaĵaron.

Tamen, kiam Esperanto eliris el la presejo Keltera antaŭ 117 jaroj, unue ĝi iris sur la vojo intencita de Zamenhof kaj la unuaj pioniroj, ne laŭ la animo de

¹ La prelego estas mallongita versio.

Esperanto. En la unua libro de 1887 Zamenhof nur enmetis kelkajn mallongajn tekstojn en la nova lingvo, tie "vort`o`j, divid`at`a`j unu de la ali`a per sign`et`o". La signetoj ne nur faciligis serĉadon de la nekonata vorto en la vortaro, ankaŭ donis al la nova lingvo apartan vizaĝon. En la komenco de 1888, Zamenhof aperigis la duan libron pri sia lingvo. En tiu libreto Zamenhof aperigis kelkajn tekstojn en Esperanto. Li kredis ke tio helpos al la lernantoj regantaj la regulojn de la gramatiko kaj komprenantaj bone la signifon kaj la uzon de la vortoj. Per ĉi tiuj ĉirkaŭ 30 paĝoj da modelaj tekstoj, Zamenhof refoje pionire enkondukis novan koncepton. Tio ege gravas por nova lingvo, ĉar ĝi ankoraŭ ne havis memstaran semantikan sistemon. Por vere funkciigi la lingvon necesis plifruie formi la semantikan sistemon, sendepende de fontaj lingvoj. Tiuj ĉi tekstoj estis bazo por fari tion. Mia opinio modela tekstaro estas tre utila kaj gravega por la formiĝo de Esperanta semantika sistemo. Tio eble iomete klarigas, kial la Ekzercaro estas unu el esencaj partoj de FUNDAMENTO. Ekde la dua libro ni ne plu trovas la signeton, kiu dividas la vorton inter blankoj. Sen signeto la nova lingvo almenaŭ suprajne pli similas al eŭropaj lingvoj.

Vere ni povas diri, ke Zamenhof kreis lingvon kun animo, kiu enkorpiĝas en ege regula gramatiko kaj vortfarado kaj klara finaĵaro liganta vortojn por esprimi la kompleksan ideon. Tamen, en la evoluado de Esperanto modela tekstaro estas tre grava por fari la animon viva en la lingva sistemo.

Nu, nature la problemo venas. Se la reguleco estas la plej grava elemento de animo de Esperanto, se la reguleco donas al nia lingvo simplecon kaj facilan lerneblecon kaj komfortan produktecon, se ĝi faras Esperanton optimuma lingvo, kial oni ne povas senescepte multe uzi la regulojn por evoluigi nian lingvon, precipe, se la faro ne tuŝus la stabilecon de Esperanto, se la faro ne malaltigus la kvaliton de Esperanto en interkomunikado. Ĉu vere ne ekzistas meza vojo inter skemismo kaj naturalismo? Fakte, tio ĝuste estas vojo delonge serĉata de multaj aziaj E-parolantoj. Kompreneble, ankaŭ estas kolego klopode serĉi la spontanegan orient-aziismon el socilingvistika vidpunkto, ekzemple, USUI Hiroyuki sekvspuras la historion de la interesa esprimo 'kunloĝado'.

Nu, estas tempo doni kelkajn aĵojn el mia ĉina koro. Ĉu vi povas akcepti novajn sufiksojn por monato kaj semajno proponitan de ĉino?

-bro por monato: unbro (januaro), dubro (feburaro), tribro (marto), kvarbro (aprilo), kvinbro (majo), sesbro (junio), sepbro (julio), okbro (aŭgusto), naŭbro (septembro), dekbro (oktobro), dekunubro (novembro), dekdubro (decembro).

-do por semajno: undo (lundo), dudo (mardo), trido (merkredo), kvardo (ĵaŭdo), kvinndo (vendredo), sesdo (sabato), sepdo (dimanĉo).

Teorie, la solvo estas pli efika ol la nuna ne nur por lerneblo, sed ankaŭ por rekoni kaj produkti. Jen kelkaj ekzemploj de kunmetoj Esperantaj kompare kun la Ĉina lingvo:

reĝ + palac + = reĝpalac- wang + gong = wanggong 王宮

vesper + manĝ = vespermanĝ-	wan + can = wancan 晚餐
fer + voj = fervoj-	tie + lu = tielu 铁路
kap + dolor = kapdolor-	tou + tong = 头痛
ter + trem = tertrem-	di + zhen = dizhen 地震
ter + kultiv = terkultiv-	zhong + di = zhongdi 种地
klar + vid = klarvid-	kan + qing = kanqing 看清

Laŭ tiuj ĉi ekzemploj, la du lingvoj havas tre similajn strukturojn de kunmetaĵoj, tamen en la ĉina lingvo oni povas iri pli fore, ĉu eŭropaj esperantistoj ankaŭ volas daŭre antaŭiri laŭ la sama vojo? Tio signifas ĉu vi povas akcepti la kunmetaĵojn en la tria listo?

Tramo	dianche 电车	elektroveturilo
Kurento	dianliu 电流	elektrofluo
Cirkvito	dianlu 电路	elektrovojo
telefono	dianhua 电话	elektroparolo
komputilo	diannaο 电脑	elektrocerbo
filmo	dianying 电影	elektrobildo

.....

Nu, la vera demando ankaŭ estas, kie troviĝas la ekvilibra mezo?

Laŭ la vidpunkto de aziano, Esperanto povus esti pli regula, ĉar ĝi signifas simplecon kaj facilan lerneblecon. Tio estas la radiko de Esperanto. Ni scias ke Esperanto denaske portas eŭroplingvan vestaĵon, sed ĝi havas sian animon neeŭropecan. Do, la regulecon ĉiaman ĉiuj uzantoj devas obei. Nur sub tia kondiĉo, simpleco kaj facila lernebleco povas esti garantiata. Sen tiu trajto ĉio perdiĝos.

Antaŭ 117 jaroj, Zamenhof kreive konstruis Esperanton surbaze de tute nova lingvistika koncepto por eŭropanoj, tamen li ne plene evoluigis sian lingvon laŭ tiuj principoj por facila komenco de la lingvo. Hodiaŭ estas tempo por plene evoluigi la lingvon laŭ ĝia animo, ĉar tio estas utila por pli vastaj lernantoj en Azio. Tamen, ĉiuj devas agadi en la kadro permesita de la Fundamento, ĉar oni devas strebi stabilan evoluadon.